

TERMINOTEKO

Informilo pri terminara laboro en Esperanto en kunlaboro
kun

Perkomputora Termino-Kolekto (Terminoteko/Pekoteko)

aperas laŭbezone; represo kaj diskonigo de la informoj
estas dezirata

Redaktanto: Bernhard Pabst, Südweg 42, D-5202
Hennef-Heisterschoß, Germanjo

**Cirkulero n-ro 7 (2a jaro, 6/1992: oktobro 1992)
lasta prilaboro: «93-05-23»**

=====

Estimata sinjorino, estimata
sinjoro, karaj geamikoj,

jen la sepa cirkulero de Terminoteko, unuan fojon en nova formato A5. Volonte ni ŝatus evoluigi ĝin de cirkulero al bulteno aŭ eĉ revueto, sed ĉu tio trovus vian intereson kaj tiun de viaj konatoj kaj amikoj, kiuj iam okupis sin pri terminaraj demandoj? Ni tre ĝojus, se vi povus sciigi al ni vian opinion pri tiu demando. Tiu cirkulero estu ekzemplo, kiel terminara bulteno povus aspekti. Kompreneble viaj aldonaj ideoj, proponoj, infor-

moj aŭ eĉ pretaj artikoloj estas bonvenaj. Sed vidu pli detale nian enkondukan artikolon.

Por ke vi povu simple sperti ĝin en la praktiko, ni en tiu cirkulero prov-cele uzas la sufikson «-j/», proponitan de sinjoro *Cool* kaj indikantan ŝtatnomojn. Pri la detaloj vd. la rubrikon "terminikaj diskutoj" kaj laŭeble prikomentu ĝin respondante la demandilon je la fino de tiu ĉi cirkulero.

Agrablan legadon deziras al vi
Sincere pb

PS: Kelkaj aktivuloj jam ricevis malneton de tiu ĉi cirkulero. Jen la korektita versio kun parte novaj informoj (vd. ekz. p. 6).
pb

enhavo

Saluton	1
Ĉu terminika revuo kaj kia?	2
terminikaj diskutoj	2
novaj terminaroj	3
terminaraj projektoj	7
el la ne-Esperanta terminara mondo	9
la historia terminaro	9
kiel uzi la respondilon por diskutoj?	10
respondilo	11

Ĉu terminika revuo kaj kia?

Terminologia Esperanto-Centro (TEC) de UEA iam planis eldoni Esperantan fakrevuon pri terminologio (vd. TEC-bulnenon n-ro 6 (1990), p. 5). Tiuj planoj neniigis pro la milito en iama Jugoslavjo kaj la pereco de la TEC-oficejo en Zagrebo. Nia respondo al la tiu-tempa alvoko jam restis nerespondita. De la nova TEC-oficejo en Ĉeĥujo (vd. nian ckl. 6) ni ĝis hodiaŭ, kvankam estante membro de TEC, ne ricevis plian TEC-bulnenon. Numero 8 de aprilo

1991, sendita de Zagrebo, restis la lasta.

Pro tio ni ŝatus proprainiciative repreni la ideon kaj scii, ĉu ekzistas sufiĉe da intereso por periodaĵo, kiu informas pri terminologio kaj rilataj fakoj kiel dokumentado, bibliografio, komunikado k.s. Anstataŭ teorii pri ĝia aspekto kaj konsisto ni per tiu ĉi cirkulero rekte volas doni al vi ideon, kiel tia modesta informilo povus aspekti kaj pri kio ĝi povus raporti.

Ni konscias pri la sorto de multaj fakaj periodaĵoj Esperantaj kun malgrandegaj eldonkvantoj kaj pri la laborego necesa por eldoni ilin. Ni pro tio klare preferus aldoni ekz-e kelkajn paĝojn al jam regule aperanta revuo aŭ bulteno laŭ la principo de la "kajero en la kajero". Ankaŭ kunlaboro kun "najbaraj" fakaj publikigaĵoj, kiel ekz-e la iama Biblioteka Bulteno aŭ komputora aŭ libroserva bulteno estus bonvena.

La cirkuleron krom la aktivuloj en la terminara kampo ankaŭ ricevu ĝeneralaj Esperantogazetoj, kiuj rajtu laŭplaĉe disvastigi la priterminarajn informojn.

Por produkti kaj dissendi tiun ĉi cirkuleron de Germanjo en oktobro 1992 la averaĝaj nuraj material-kostoj (afranko, fotokopioj, koverto) minimume

estas:

- Por unu ĝis tri folioj (4 ĝis 12 paĝoj en formato A5): ĉ. 2,50 DM
- por 4 ĝis 8 folioj (16 ĝis 32 paĝojn en formato A5): ĉ. 3,80 ĝis 4,- DM, depende de la distribuo de en- kaj eksterlandaj (aer-poŝtaj) abonantoj. Tamen notu, ke la Germana poŝto jam anoncis drastan prezaltiĝon por 1993 (forfalo de speciala tarifo por presaĵoj). Tiuj sumoj, kiel dirite, kovras nur la bazajn material-kostojn kaj neniel kompensas ĉiujn necesajn laborojn, kiuj devus okazi libere kaj sen honorario. Por realigi nur du numerojn jare necesus do minimuma kontribuo de ĉ. 10,- DM, por ke estu kovrataj ankaŭ sendaĵoj informaj kaj solidaraj al ricevontoj ne povantaj pagi.

Ĉu vi konsiderante ĉion ĉi tamen pretus - ankaŭ finance - subteni tian informilon? Ĉu vi kiel redaktisto de ekzistanta Esperanto-periodaĵo interesiĝas pri kunlaboro? Ĉu vi pretas kunlabori, verkante por la nunaj aŭ pliaj rubrikoj? Viaj rimarkoj, opinioj kaj ideoj estas bonvenaj (vd. la respondilon).

terminikaj diskutoj

Ni hodiaŭ prezentas al vi

proponon por ebla solvo de la landnoma problemo de sinjoro *Cool* unuafoje prezentitan en Akademias Studoj (AkSt) 1984, p.105 ss. Informcele sinjoro *Eichholz* metis ĝin en la Esperantan Bildvortaron de 1988, kio provokis parte akran kritikon, parte ankaŭ konsenton. Jen la kompleksa el Plena Pekoteko 1985-1990 (PP) # 87/005 kun la ĝis nun kolektitaj argumentoj:

```
{U1} 32
{T1} RBZ
{eol} -j**/*a
```

Proponita sufikso por indiki sendependan ŝtaton: Germanjo, Francjo. Por pliaj ekzemploj vidu la bildkomplekson 14 en Esperanta Bildvortaro.

Fon: *a coo (Akademias Studoj 1984, p.105);

87/005

Rim: ej: Kiel detale montrita en AkSt. 84 kaj 85 aplikante tiun novan sufikson oni povus klare distingi inter geografia regiono (kun sufikso **-i/**), lo -regiono de gento (kun sufikso **-uj/**) kaj ŝtato. Manko de sufikso indikus ĉiam gentonomon, kaj tiel solviĝus la ofenda disputo pri la signifo de la vorto "Koreo". Vidu miajn rimarkojn en AkSt. 88-90, p. 332, kaj tiujn de la recenzinto de EB, p. 337.

garc (90-06-25): Mi opinias, ke geografiaj nomoj kiel Italjo,

Franco, Germano estas tolerindaj (eĉ en iuj okazoj preferindaj), ĉar en Esperanto ne ekzistas malpermeso por sinkopoj, precipe se per aplikado de tiu figuro, tio ne kaŭzas miskomprenojn.

go (91-02-04): Mi ne opinias ĝin utila; male, ĝi komplikos la landnoman nomenklaturon. Ek de la tempo, kiam Cool elcerbigis ĝin, nur vi kaj li uzis ĝin. La esperantista popolo ne volas ĝin kaj ne bezonas ĝin. Cetere, la "-j" malfaciligas la prononcon de nomoj.

ej (91-02-25): Ne akordiĝas kun la faktoj, ke nur mi kaj *Cool* uzis tiun sufikson, kiel mi povas pruvi. Sed tio ne gravas. Mi nur volis komuniki eblecon, kiel oni povus solvi la landnoman problemon alimaniere kaj nediskriminacie. Se Esperantistoj ne deziras elprovi tiun vojon, la nuna nekontentiga stato restu. Mi ne okupiĝos pli pri tiu detalo. «91-02-24»

Se vi deziras esprimi vian opinion pri tiu punkto, bv. prikomenti la proponitan ŝtatnoman sufikson. Por faciligi al vi tion ni reprints demandaron el Plena Pekoteko 1985-90 (PP) en la respondilo je la fino de tiu ĉi cirkulero. En PP vi trovos sur ĉ. 130 paĝoj multegajn pliajn demandojn al vasta gamo de

vortfaraj problemoj en Esperanto.

novaj terminaroj

Azia IKEV

F. MUNNIKSMĀ (red.), Internacia komerca-ekonomia vortaro en dekunu lingvoj [IKEV], Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1990, ISBN 7-5052-0025-9/H23

Jam en 1990 aperis senŝanĝa represo de la fama IKEV de 1974 (1a eld., 2a senŝanĝa 1975), kiu jam delonge estis elĉerpita. La nura fakto de represo do jam estus salutinda, ĉar malgraŭ kelkaj mankoj IKEV ankoraŭ estas la plej bona ekonomia fakvortaro de Esperanto kaj povas servi kiel modelo por aliaj fakaj terminaroj. Sed la - se oni deziras tiel kalkuli - tria eldono (aŭ dua represo) eĉ enhavas tradukojn en du pliaj lingvoj, nome en la Japana kaj Ĉina, kiuj aldoniĝas al la ĝisnunaj ok Eŭropaj Angla, Germana, Hispana, Franca, Itala, Nederlanda, Portugalaj, Sveda kaj unu internacia, Esperanto, fakto necesiganta ŝanĝon de la titolo al "... en 11 lingvoj". (Okcident-)Eŭropanoj do povas ĝoji pri rehavigo de grava verko,

(orient-) Azianoj pri unuafoja havigo. Laŭ la "Antaŭparolo por la tria eldono" de sinjoro Bruno Vogelmann, kiu jam kunlaboris ĉe la origina eldono kaj nun motoris por la Azia, estas preparataj kaj preskaŭ jam pretaj du pliaj eldonoj, nome orient-Eŭropa kun Bulgara, Ĉeĥa, Hungara, Pola, Rumana kaj Rusa lingvoj kaj eldono por la Proksima Oriento kun Araba kaj Irana lingvoj. Ne menciita estas la fakto, ke granda parto de la 2812 nocioj intertempe ankaŭ estas havebla en elektronika formo, ĉar registrita en la Terminoteko-formato. Tiu registrado celis al teknika faciligo de la revizio de la terminaro aĝanta nun jam preskaŭ 20 jarojn. La Internacia Ekonomia kaj Komerca Fakgrupo (IKEF) jam komencis la Sizifan laboron ĝisdatigi ĝin. Necesas i.a. aldoni la terminojn el ties terminaroj "ŝlosilaj vortoj en internacia komerco" kaj el Economie, Finance, Monnaie (vd. tiun ekl., p. 8-9). Sed eĉ en sia nuna stato IKEV estas unu el kaj probable "la" plej sukcesa Esperanto-terminaro, kiu servis ne nur la etan Esperanto-rondon, sed same tiun tiom pli grandan "eksteran" mondon. Imitinda ekzemplo! Kunordiganto de la orient-Eŭropa k.a. eldonoj estas Bruno VOGELMANN sen.,

Pistoriusstr. 52, D-7180 Crailsheim, Germanjo; IKEF estas kontaktebla per sinjoro Roland ROTSAERT, Visspaanstr. 97, B-8000 Brugge, Belgjo.

Mevo bunta

André CHERPILLOD, Mil Ekzotaj Vortoj [MEV], La etimo de 1250 esperantaj vortoj de ekstereŭropa deveno, Courgenard [F]: Eldono de la aŭtoro, 1992, ISBN 2-906134-17-1

Sinjoro Cherpillod, i.a. kolektanto de la konataj 6500 "NePIV-aj vortoj", kiuj intertempe ankaŭ troviĝas en la kolekto de Terminoteko, certe estas la majstro de multalfabeta tekstprilaboro en Esperantujo. Ĉu Araba, Ĉina, Hebrea, Kopta aŭ eĉ Egiptaj hiroglifoj, "Cherpillod" havas ĉiujn! Ankoraŭ ni atendas lian jam delonge anoncitan Etimologian Vortaron de Esperanto (kiu nun devos konkurenci kun tiu de Vilborg) jen li surprizas nin per tre delikata "krom-produkto" de la etimologia projekto: la lingvo-historio de 1250 vortoj, kiujn Esperanto ĉerpis el ne-Hind-Eŭropaj aŭ ekster-Eŭropaj lingvoj, precipe el Araba, Amerikaj, Hebrea, Japanaj kaj multaj aliaj lingvoj. Pri la "ekzoteco" (el

Eŭropa vidpunkto) de vortoj kiel «koenduo» (Sudamerika ronĝulo), «ipekakvano» (vomiga drogo), «huntuno» (Ĉina manĝaĵo) vi certe konsentas. Sed kion pri "ekzotaĵoj" kiel «koĉero» (el la Hungara), «magazeno» kaj «koton» (el la Araba) aŭ «karto» (el la Kopta kun ebla rilato al la Sanskrita)? MEV ..., agrablaj promenoj tra nia kultura heredaĵo, grava argumento por la internacieco de Esperanto, gravega instruilo en tempoj de nova kultur-ŝovinismo.

Bilde instrui

Sylla CHAVES, Originala Esperanto-Bildvortaro [OEB], San-Paŭlo [BR]: Esperanto-Asocio, 1991

Jen plia bildvortaro nuntempa, post la "Praktika" de Oksfordo kaj la monumenta "Esperanta" de Eichholz. Moderna, kun klaraj, parte amuzaj bildoj, desegnitaj speciale por tiu Brazildevena Esperanto-vortaro, ĝi celas precipe la lernanton, i.a. klopodante per bildoj klarigi gramatikajn finaĵojn kaj sufiksojn. Kelkaj malmultaj novismoj, precipe por Sudamerikaj fruktoj, bestoj kaj manĝaĵoj estas sufiĉe glositaj. Alfabeto kaj laŭfaka indekso faciligas la

aliron al la baza vort-stoko de nia lingvo. Ne imitinda ŝajnas al mi indiki la gradon de oficialeco per diversaj majuskligoj: «ABELO» (apartenas al Baza Radikaro Oficiala, BRO), «Abismo» (oficiala vorto ekster BRO), «abdomeno» (ne-oficiala vorto). Aliaj indikiloj, kiel asterikoj k.s. ŝajnas pli taŭgaj. La bindo por ofte uzata vortaro estas iom malforta. Tamen OBE certe trovos sian lokon inter niaj bildvortaroj kaj en la kursoj.

Tra la marĉo

Lorens' MI, Toponomia terminaro, Landonomoj, landanonomoj, toponimoj, regnonomoj, kunmetitaj laŭ la modelo de la Interreta Vortaro de Ordinara Esperanto, Belfast [GB]: Istlia Eldonejo Esperantista 1992, IV + 12 p.

La broŝureto kunigas ĉ. 450 landnomajn kaj rilatajn terminojn. Krom la proponitajn leksojn ĝi enhavas koncizajn, ne ĉiam trafajn difinojn. Ĝi estas "kromprodukto" de la laboroj super la planata Interreta Vortaro de Ordinara Esperanto (IVOE), kiu celas precipe jam iom progresintajn lernantojn. Forme la terminareto apenaŭ transsaltas la hurdon de mini-

muma kvalito, sub kiu oni ne plu honoru eldonaĵon per recenzo. Perkomputore produktita kaj malbonege kopiita, ĝi en kelkaj partoj simple ne estas legebla, en la plej multaj nur pene. Nur la fakto, ke tiu kolekto iun tagon eniru IVOE-n entute pravigas kritikan pritrakton.

Enhave ĉiu projekt(et)o pri landnomoj estas kuraĝa. Apenaŭ ekzistas iu tereno en nia lingvo, kie tiom da detaloj estas pridisputataj, kie ekzistas tiom malmulte da firma grundo, apenaŭ iu tereno, kiun oni malsekigis per tiom da inko. La aŭtoro vagas tra tiu marĉo kun la "baza filozofio", ke "ne decas uzi la finaĵon -ujo" por "registaro" (? tiel!) kaj plie ke "ne eblas elpensi regulon", kiel elekti landnomon. Forĵetinte la preskaŭ solan ankron de la Fundamento pri la demando, nome ties finaĵon -ujo, li ŝajne liberigas sin de ĉiu bezono je lingvaj argumentoj. Konsekvence li eĉ ne menciis (espereble ja konsultis) siajn pli gravajn antaŭulojn kiel PIV, Bildvortaron, Poŝatlaso de la Mondo, Leksaran Kolekton de Ofte Uzataj Propraj Nomoj, ktp. En plena libereco kelkaj terminoj sensisteme kontraŭas sin reciproke: princlando, reĝlando, sed sultanregno, emirregno, tamen

Unuiĝintaj Arabaj Emirlandoj. Afganistano (PIV Afganujo, Afganio), sed Taĝikio. Ŝtatoj estas skribataj majuskle, loĝantoj minuskle (Albanio sed albano). Antaŭvokalan «ŭ» de la tipo "Bocŭano" la aŭtoro preferas al la tradicia formo kun «v» (PIVS Bocvano) probable pro la influo de la Angla. Adjektivajn atributojn li ligas per streketo (Suda-Jemeno, PIV Sud-Jemeno). Al "Jamaiko" (PIV) aŭ "Ĵamajko" (Krause) li aldonas "Jamajko" kaj (lia prefero) "Ĝemajko" aŭ "Ĝemejko" (ne legebla). Li do proponas anstataŭigi la PIV-an grafisman transskribon, kiu estas kaj internacia kaj tradicia kaj simila al la Franca prononco (Jamaïque), per laŭsona transskribo surbaze de la Angla. Multaj argumentoj indikas, ke lia propono ne estas la plej bona. Multajn similajn ekzemplojn oni facile trovas.

Antaŭ ol enigi la nun publikigitajn, sed apenaŭ pravigitajn terminojn en IVOE-n, la aŭtoro malkaŝu siajn gvidliniojn kiuj malgraŭ siaj enkondukaj vortoj ja ekzistas. Ideala forumo por tio estas la baldaŭ aperonta verko "Plena Pekoteko 1985-90", kiu enhavos tre detalan demandaron pri unuopaj tiklaj punktoj vortkraj, i.a. pri ĉiuj supre aluditaj problemoj. Per tiu enketo ĉiu povos esprimi siajn lingvajn pre-

ferojn kaj motivigi ilin anstataŭ nur orakli, ke reguloj ne ekzistus. La rezulton de la pridemando la aŭtoro ĉiukaze konsideru, por ke lia kolekto, nun ankoraŭ tro forte bazata sur personaj "inventoj", ne fariĝu plia alfluo al la landnoma marĉo.

Lupeo malakra

G.F. MAKKINK, Nia Fundamento sub lupeo, Antwerpen [B]: Flandra Esperanto-Ligo 1990, ISBN 90-71205-39-8

Gvidilo tra kelkaj disputataj gramatikaj punktoj de la Fundamento, (supraĵe) traktanta i.a. ankaŭ vortarajn problemojn: "Novaj vortoj" (p. 77-79), "Universala Vortaro" (UV, p. 80-83), "Majuskloj" (p. 110-113) k.a. La profundeco de la argumentado tre varias: Oni komparu la detalegan ĉapitron pri la artikolo (11 p.), jam antaŭe aperinta kiel aparta studo, kun tiu pri majuskloj, kerne limiganta sin al jena - cetere tiuforme malĝusta - frazo: «Zamenhof ne donis majusklon al nomoj de popoloj, ĉar ili koncernas kategorion de multaj individuoj.» Malprave pro tio aperus majuskloj en jenaj kvar kazoj, kie Zamenhof - kontraŭe al la supra aserto - tamen

ja uzis ilin en la Fundamento, nome ĉe Turko, Hispano, Germano kaj Franco. Tipa ekzemplo de "argumentado" per *petitio principii*!

La dekan eldonon de la Fundamento la aŭtoro ne jam povis konsideri, nek ŝajne la Etimologian Vortaron de Vilborg, alikaŭze la magra ĉapitro pri UV apenaŭ estas klarigebla. Malgraŭ ĉio: Varia kaj grandaparte interesa analizo de la Fundamento kun konkludoj plue diskutindaj.

Fundamenta ŝanĝo, ĉu?

L.L. Zamenhof, Fundamento de Esperanto [FdE], Deko eldono kun Enkondukoj, Notoj kaj Lingvaj Rimarkoj de D-ro A. Albault, Pisa [I]: Edistudio, 1991

Preskaŭ tute senŝanĝa represo de la naŭa eldono Marmande 1963, kiu tre salutinde faras la bazan verkon de Esperanto denove facile akirebla al ties adeptoj. Se la recenzanto tamen skribas "preskaŭ", li pensas pri la escepto: Sinjoro Albault, laŭ sia "Antaŭvorto al la 10-a eldono" «faris .. ok korektojn, specife al la etno-nomoj .. . Tiel "angl'(o)" fariĝas "Angl'(o)", "franc'(o)" fariĝas "Franc'(o)",

ktp.»

Jen .., jes ja, sensacio! Ni daŭrigu legi: «La etno-nomoj estas kolektivaj propraj nomoj aŭ "apelativoj", laŭ la termino sub kiu mi priskribis aliloke tiun nom-klason: kiel tiaj ili ricevu majusklon konforme al la Fundamento.» [Substreko de ni] Tio do estas kvazaŭ deviga argumento: La Fundamento mem preskribas la uzon de komenca majusklo ĉe la "etno-nomoj", do ĉe ekz-e "Anglo" aŭ "Franco".

«Plie estas pli bone kaj ofte pli klare, kiel montris Waringhien (PIV) [pli precize je p. xxxii; ni rajtas aldoni "kaj Eichholz en Esperanta Bildvortaro p. 4 kaj en Akademias Studoj (AkSt) 1983, p. 40 kaj nelaste Albault mem en AkSt 1985, p. 30] kaj kiel sugestas la Tabelo de Enhavo de la Fundamento mem, ke la rekte derivitaj adjektivoj konservu tiun majusklon.» Jen do ne nepre deviga, tamen argumento de oportuneco. Kune tiuj du palaj paragrafoj signifas ne malpli ol renversigo de multjardeka kaj ankoraŭ reganta lingvo-uzo pri tiu punkto de la Esperanta gramatiko. Kaj kial ĉio ĉi nur nun, en la deka eldono? «Tiu korektado, nome la majuskligo de la etno-nomoj, estis farita konforme al la vortlistoj [sekvas la trov-lokoj], kaj ankaŭ al la Tabelo de Enhavo

[sekvas trovloko].»

Jen la citaĵoj: «uj .. Turko Turco Turkujo Turquie [same por la tradukoj Angla, Germana, Rusa, Pola]», «Hispano», «Germano», «Nov-Jorko Nov-Jorkano», «Varsoviano», «Grammaire (Gramatiko Franca)», «Grammar (Gramatiko Angla)» ktp. same por Germana, Rusa kaj Pola gramatikoj. Ĉu ni do rajtas esperi, ke la "majusklo-milito" finiĝos? Ke kelkaj redakcioj ne plu fuŝ-"korektos" niajn manuskriptojn pri tiu punkto? Kion vi opinias? Valoras (re-)legi la argumentojn en la cititaj artikoloj. En la venonta cirkulero ni revenos al tiu punkto kaj prezentos al vi detalan demandaron.

kompro daŭras

Periodaĵo interesa por la komputorantoj inter niaj Esperantaj terminaremuloj daŭre estas "kompro", eldonita de sinjoro Jürgen Wulff, Bornkamp 12, D-2000 Hamburg 70, Germanjo. Aperanta jam en la sepa jaro, ĝi traktas precipe teknikajn problemojn de komputorado, ekz-e pri la diakritaj literoj, sed foje ankaŭ problemojn de la terminaro pri informadiko, vd. ekz-e la diskuton pri la proponita teknika sufikso «-ap/», indikanta komputoran programon, en

KompRo 89/1, kaj represita en Plena Pekoteko 1985-1990 (PP) # 85/432.

terminaraj projektoj

1. En nia cirkulero 6 ni serĉis kunlaboranton, kiu pretus helpi al sinjoro Doug Portmann, 1517 Raymond Dr., Apt. 101, Naperville, Illinois 60563, Usonjo pri kelkaj kemiaj terminoj, bezonataj en la prepar-laboroj de Kemia kaj Scienca-Teknika Vortaro (KSTV). Nun sinjoro Portmann sciigas nin, ke KSTV aperos jam en 1993, se ne io neantaŭvidebla intervenos. Post la Biblioteka Terminaro de 1989 tio jam estos la dua grava vortaro de nia Usona samideano.

2. Sinjoro E.T. Grimley Evans, Robert-Koch-Str. 56, D-6602 Dudweiler, Germanjo, kiu jam multe kontribuis al la elektroteknika vortaro de Terminoteko, profesie okupiĝas pri komputoraj sistemoj. Li atentigas nin pri la tutmonda reto liganta multegajn komputorojn kun la "interna lingvaĵo" UNIX, uzata kutime en maŝinoj pli grandaj kaj kapblaj ol "simplaj" personaj komputoroj kaj troveblaj ekze en multaj universitatoj. «En la Reto estas nun minimume 150 E-istoj. Indas meti Pekotekon en

la Reton» li skribas. Ĉar ni konsentite iom malnov-moda daŭre uzas "izolan" komputoron ne ligitan al elektronika reto kaj ĉar sinjoro Grimley Evans pro aliaj devoj ne povas helpi, ni volonte trovus iun el inter la 150 Esperantistoj-Retistoj, kiu povus peri inter Terminoteko kaj la Reto. Teknike tio probable ne estos problemo, ĉar Terminoteko, uzanta la monde plej disvastiĝitan tipon de personaj komputoroj ankaŭ tiurilate estas "malferma" al aliaj sistemoj. Propono por unuece konverti Terminotekon al kruda formo uzanta nur 124 diversajn karakterojn estas havebla de nia supra adreso. Kiu helpos?

3. La Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo (IKEF) anoncas, ke ĝi intertempe finis la Esperantigon de la EK-terminaro *Economie, Finance, Monnaie* (Ekofomo) [vd. nian informon en ckl. 6, p.2]. Ekofomo estas havebla etkvante en printita formo aŭ sur diskedo (IBM-sistemo). Ĝia nuna formo estas preskaŭ jene (tamen printita per alia skribo kaj printatoro):

- | | | |
|-----|----|---|
| 743 | Eo | valorpapera kurzo |
| | F | cours des titres; prix des valeurs mobilières |
| | E | price of securities |

9 2 / e f - 1 0 0 0

744 Eo obligacia kurzo
F cours des obligations
E price of debt securities; bond price

La originala terminaro "Ekofomo" tamen entenas krom Franca kaj Angla ankoraŭ ekvivalentojn en Germana, Itala, Nederlanda kaj Dana lingvoj. Parte ni jam aldonis ilin kaj en konsento kun IKEF transformis la terminaron al la formo de Terminoteko. Fine la verko povus aspekti jene:

Rim: <92-10-18>

{eo1} **produktiv/ec/o** *b
{eo2} **rentabilitat/o** *c
{da1} produktivitet *a
{de1} Produktivität *f* *a
{en1} productivity *a
{fr1} productivité *f* *a
{it1} produttività *f* *a
{nl1} produktiviteit *a

Fon: *a ECO; *b IV; *c IKEV#2017;

9 2 / e f - 1 0 0 1

Rim: <91-12-06>

{eo1} **kapacit-uz-grad/o** *b
{da1} kapacitetsudnyttelsesgrad *a
{de1} Auslastungsgrad *m* der Produktionskapazitäten *a
{en1} degree of utilization of industrial production capacity *a
{en2} capacity utilization rate *a
{fr1} taux d'utilisation des capacités (dans l'industrie) *a
{fr2} degré *m* d'utilisation des capacités *a
{it1} tasso *m* d'utilizzazione delle capacità *a
{it2} grado *m* di utilizzazione delle capacità *a
{nl1} bezettingsgraad van de produktiecapaciteit *a

Fon: *a ECO;

{eo1} **salajr/o-kost/oj** *a
{da1} lønomkostninger *a
{de1} Lohnkosten *f, pl* *a
{en1} wage costs *a
{en2} wage and salary costs *a
{fr1} cots *m, pl* salariaux
{fr2} masse *f* salariale *a
{fr3} charge *f* salariale *a
{it1} costo del lavoro *a
{it2} costi salariali *a
{nl1} loonkosten *a

Fon: *a ECO;

9 1 / e f - 1 0 0 2

Rim: <91-12-06>

{eo1} **po'produkt-unu/aj salajr/o-kost/oj** *b
{eo2} **po/aj salajr/o-kost/oj** *b
{da1} lønomkostninger pr. produceret enhed *a
{de1} Lohnkosten *f, pl* je Produkteinheit *a
{en1} unit labour costs *a

{fr1} cots m, pl salariaux par
unité produite *a
{fr2} cots m, pl salariaux
unitaires *a
{it1} costi salariali per unità
prodotta *a
{it2} costi unitari di
manodopera *a
{nl1} loonkosten per eenheid
produkt *a

Fon: *a ECO;

9 2 / e f - 1 0 0 3

Rim: «92-01-01»

{eo1} **kost/o-prem/o** *b
{da1} omkostningspres *a
{de1} Kostendruck m *a
{en1} pressure of costs *a
{fr1} pression f des cots *a
{it1} pressione dei costi *a
{nl1} kostendruk *a

Fon: *a ECO;

9 2 / e f - 1 0 0 4

Rim: «92-01-01»

{eo1} **inflaci-mekan/ism/o** *b
{da1} inflationsproces *a
{de1} Inflationsvorgang m *a
{de2} inflationärer Prozeß m *a
{en1} inflationary process *a
{fr1} mécanisme m de
l'inflation *a
{it1} processo m
inflazionistico *a
{nl1} inflatieproces *a

Fon: *a ECO;

9 2 / e f - 1 0 0 6

Rim: «92-01-01»

Ni jam aldonis Germanajn ekvivalentojn al ĉ. triono de la pli ol 1000 nocioj. Kiu klavos la ankoraŭ mankantajn Germanajn, Italajn, Nederlandajn k Danajn ekvivalentojn? Bv. kontakti sinjoron Roland Rotsaert, Vis-spaanstr. 97, B-8000 Brugge, Belgjo.

4. Sinjoro Wiersch informas, ke FGTB-Esperanto, B-5000 Namur, Belgjo aldonas Esperantajn tradukojn al la Eŭropa terminaro *Monde du travail et du mouvement syndical* (glosaro pri labor-rilatoj kaj sindikata movado).

el la ne-Esperanta terminara
mondo
la historia terminaro

Jen du rubrikoj ankoraŭ mal-plenaj en tiu ĉi cirkulero.

Devus aperi novaĵoj pri internaciaj terminaraj organizaĵoj, Infoterm k.s. Plej bone verŝajne iu alia kunlaboranto de TEC povus raporti tie ĉi. Kiu pretas?

Povus troviĝi artikolo pri terminaro grava por lingva evoluo de Esperanto.

Kiel uzi la respondilon por terminikaj diskutoj?

Detalajn informojn vi trovos en PP. Jen mallongigita klarigoj: Post ĉiu demando vi indiku post A___ B___ C___ D___ viajn poentojn. Po demando ĉiu rajtas atribui maksimume 9 poentojn. Se vi klare preferas nur unu el la indikitaj eblecoj, notu ĉiujn 9 poentojn post la litero indikanta la opcion. Se vi hezitas, distribuvi viajn poentojn.

Jen kelkaj respondo-ekzemploj kun nia interpreto:

A. antaŭhistoria epoko; **B.** Antaŭhistoria epoko; **C.** Antaŭhistoria Epoko.

A 9 B___ C___

Persono, kie respondus tiel, estas konvinkita, ke "antaŭhistoria epoko" ne estas propra nomo, kaj ke tial la esprimo ne devus ricevi majusklojn.

A 6 B___ C___

Tiu ĉi respondinto havas la saman opinion, sed ne estas tiom certa, kiel la antaŭa respondinto.

A 4 B___ C 4

A 1 B 1 C 1

A 3 B 3 C 3

La unua respondinto ne scias ĉu preferi A aŭ C. Ambaŭ terminoj povus esti trafaj depende de la situacio.

La dua respondinto ne havas

fortan opinion pri la afero, kaj ne volas esprimi siajn preferojn.

La tria respondinto pli forte opinias, ke li ne kapablas juĝi pri la afero.

A. la epoko de la tajlita ŝtono; **B.** ŝtonepoko; **C.** ŝton-epoko; **D.** tonepoko; **E.** ton-epoko; **F.** ton-Epoko;

(87/780)

A___ B___ C___ D 3 E___ F 6

La respondinto preferas "ton-Epoko", sed akceptus ankaŭ terminon "tonepoko".

A. mezepoko; **B.** Mezepoko; **C.** mez-epoko; **D.** Mez-epoko; **E.** Mez-Epoko;

A 5 B___ C 4 D___ E___

La respondinto ne konsideras "mezepoko" kiel propran nomon. Li ne kontraŭas enmeton de divid-streko, sed li preferus la vorton sen ĝi.

Kompreneble la de vi indikitaj preferoj por iu termino validu nur por la indikita nocio-komplekso. Inter la opcioj povas troviĝi multaj taŭgaj terminoj. Tamen vi ne donu poentojn al ili, se vi opinias, ke ili estas ne sufiĉe precizaj aŭ esprimivaj por servi kiel termino por la donita nocio.

Ofte povas esti bone, se oni pro

stilaj kaŭzoj disponas pri du terminoj por precize la sama nocio. En la aliaj kazoj malgrandaj nocio-diferencoj povas ekzisti inter terminoj, tial kelkfoje ĉiuj povas utili. Se vi opinias tion, disdonu saman nombron da poentoj al ĉiu opcio. Se vi ne komprenas iun nocion, notu la nombron 0 post ĉiu opcio. (Tio do signifas, ke vi pripensis la aferon, sed ke vi ne sentas vin kapabla, fari iujn rekomendojn. Estas pli bone voĉdoni tiel, ol senpripense atribui iujn poentojn, ĉar tio povus senvalidigi la rezulton.) Se vi nenion notis en voĉdon-kampo, tio signifas, ke vi ne volis okupiĝi pri la koncerna afero.

Ĉu komplika? Vi baldaŭ alkutimiĝos. Do ek al la respondilo!

respondilo Bernhard
Pabst, Südweg 42
Bv. sendi al D-5202
Hennef 1, Germanjo

Via nomo kaj adreso en Latinaj literoj laŭ la intersekvo kutima en via lando (familian nomon bv. majuskligi)

Terminika revuo

___ Aldone mi sendas al vi artikolon por publikigo en farenda terminika revuo

___ Mi pretas kunlabori pri Esperanta terminara fakrevuo en la rubriko(j)

___ Mi proponas jenajn aldonojn kaj plibonigojn (bv. uzi apartajn foliojn).

___ Mi atentigas vin pri

jenaj publikigindaj novaĵoj el la kampo de Esperanta terminara laboro (bv. uzi apartajn foliojn).

___ Mi interesiĝas pri tia revuo kaj estus preta aboni ĝin, se ĝi kostus proksimume kiel indikita en ekl. 7
(respondo ne ligas vin jure)

___ Bv. sendi vian cirkuleron 7 ankaŭ al jena konato, kiu interesiĝas pri terminara laboro kaj kies adreson mi bone legeble notas sur aparta folio.

La proponita ŝtato-noma sufikso -j/

Mi legis la argumentojn donitajn en la respektivaj Terminoteko-kompleksoj kaj deklaras, ke mi estis tute libera voĉdoni tiel, kiel mi preferis, kaj ke neniuj rekomendis al mi, voĉdoni laŭ la preferoj de iu alia persono. Mi krome legis la klarigojn kiel indiki miajn preferojn helpe de poenta sistemo.

(Dato) (Subskribo)

Surbaze de tio mi preferas:

#118

A. Mi opinias, ke enkonduko de klare difineblaj novaj afiksoj, eĉ se ili ne ekzistas en iu etna lingvo, estus utila por Esperanto.

B. Mi opinias, ke oni enkonduku novajn afiksojn nur, se similaj ekzistas en iu etna lingvo.

C. Mi estas kontraŭ enkonduko de iu ajn nova afikso.

(87/001) **A**___ **B**___ **C**___

#118a

A. Ĉu Esperanto fariĝu pli esprimiva ol etnaj lingvoj?

B. Ĉu ni rajtas enkonduki en nian lingvon novajn lingvajn elementojn nur, post kiam tiuj internaciigis etnolingve? Kio kondamnus nian lingvon al ĉiama postrestinteco.

(87/001) **A**___ **B**___

#125

A. Estus utile, se oni povus distingi per sufikso sendependan ŝaton disde geografia regiono kaj disde genta loĝ-regiono. Tiuspeca distingo ne estus dezirinda, ĉar **B.** tro komplika; **C.** kontraŭa al rekomendoj de la Akademio;

D. _____

(87/005)

A___ **B**___ **C**___ **D**___

#696

Ĉu estus utile, se Esperanto disponus pri aparta, unu-nura sufikso, por indiki sendependan ŝtaton, por ke oni per la nomformo jam sciu, ĉu temas pri sendependa ŝtato kaj aŭ pri regiono interne de ŝtato, pri urbo aŭ rivero aŭ pri popol-nomo?

A. jes; **B.** jes, sed Esperantistoj ne interkonsentus pri unu sola taŭga sufikso; **C.** ne, enkonduko de aparta sufikso kaŭzus plian konfuson, preferinde la nuna ĥaoso pri ŝtato-nomoj restu; **D.** _____

(87/005)

A _____ **B** _____ **C** _____ **D** _____

#697

Se vi respondis la antaŭan demandon per "jes", kiun sufikson vi akceptus? **A.** -j/; **B.** -i/; **C.** -ŝtato; **D.** _____

(87/005)

A _____ **B** _____ **C** _____ **D** _____

#698

A. Mi preferas por ŝtatonomoj uzi la nomfinojn -io, -ujo, -lando, aŭ simple -o, eĉ se tiu-specaj nomoj povus indiki krom sendependan ŝtaton ankaŭ geografian regionon (Siberio, Grenlando), nomon de popolano

(Koreo), nomon de rivero (Kongo) aŭ de urbo (Meksiko) kaj tute ĝenerale iun ajn objekton.

B. Mi preferas indiki ŝtatonomojn ĉiam per -io (ekz. Kanadio), eĉ se tiu finaĵo ofte ne indikas sendependan ŝtaton. **C.** Mi preferas sekvi la rekomendojn de la Akademio pri landnomoj. **E.** _____

A _____ **B** _____ **C** _____ **D** _____ **E** _____

materialetoj haveblaj de terminoteko

Mi petas jenajn cirkulerojn de Terminoteko (unuopaj ekzempleroj senkostaj:)

___ 1. Fariĝu lingvo-observanto (ckl. stato 92-05-22)

___ 2. Usonaj subnutraĵoj (ckl. 92-07-05)

___ 3. Provregistriĝo de elektroteknika vortaro (ckl. stato 92-07-05)

___ 4. Printi Terminotekoregistraĵojn sen Letrikso – rekomendoj por komputorantoj (ckl. stato 92-06-16)

___ 5. Propraj nomoj el Sudafriko (ckl. stato 92-06-22)

___ 6. Esperanta terminara laboro en 1992 (ckl. stato 92-10-

03) _____ 7. Ĉu terminika revuo, kaj kia?

Publikigaĵoj de Terminoteko haveblaj nur de Esperanto Press, Bailieboro, Ontario, Kanado KOL 1BO (poŝtĝirkonto Hannover [D] 1173 68-306):

_____ Plena Pekoteko 1985-1990 (1816 p., 80 US\$ + 10,- US\$ por sendkostoj)

_____ Esperanta Bildvortaro (US\$ 40 aŭ DM 60 anstataŭ US\$ 48 aŭ DM 72)

_____ Eo en la Moderna Mondo (US\$ 10 aŭ DM 15 anstataŭ US\$ 25); ambaŭ rabatitaj nur, se menditaj samtempe kun PP; sen sendkostoj, se ĉio povas esti kune ekspedata.

(Anonco)

Esperanto Press
Bailieboro, Ontario, Kanado,
KOL 1BO
Tel.: (705) 939-6088

Mi antaŭmendas la ankoraŭ en 1992 aperontan 3 volumn verkon

Plena Pekoteko 1985-1990

(ĉ. 2000 paĝojn) je antaŭmenda prezo de US\$ 60.00 (aŭ DM 90.00) «anstataŭ US\$ 80.00 (DM 120.00) post apero».

Aldonu al tio US\$ 10.00 aŭ DM 15.00 por sendkostoj.

Ekvivalenton por la sumo de US\$ 70.00 mi pagos al la poŝtĝirkonto de R. Eichholz, Bailieboro, Ontario, Kanado: Hannover Konto 1173 68-306

Mia nomo:

Mia adreso:

Ricevon de _____ kvitancas (R. Eichholz, dato)

La verko ne estos havebla pere de libroservo, ĉar ĝi estas konstante reviziata kaj ni volas eviti, ke mendintoj povus ricevi malaktualiĝintajn versiojn. La elektronika versio kun pli ol 3 megabajtoj da registraĵoj kostos nur US\$ 20.00 kaj estos ĉiam kopiita de la plej aktuala versio. Bv. indiki ĉu ni sendu la registraĵojn sur 5 1/4 colaj aŭ 3 1/2 colaj diskoj. Ni ankoraŭ ne kapblas liveri registraĵojn sur diskojn kun alta denso. Mendintoj de PP povas je samtempa mendo pli favore preze akiri jenajn librojn:

*Enhave senŝanĝa represo de la eldono Majo 1993.
Multaj kontakt-adresoj, i.a. tiu de Esperanto Press en
Bailieboro ne plu validas.*

*Kontaktu nun
Bernhard.Pabst[ĉe]gmx.de
(anstataŭigu [ĉe] per @)*

© *Bernhard Pabst, Aŭgusto 2006*